

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

**DU JAPANAJ
ESPERANTISTOJ
vizitos nin
de la 18a ĝis la 20a
de septembro 2012**

Rezervu tiun daton !

Kelkaj vortoj

Dankego al la grupanoj kaj la amikoj kiuj partoprenis en nia Ĝenerala Kunveno. Dankon ankaŭ al la membroj, kiuj sendante sian rajtigilon, prizorgis nian grupon.

Grandan dankon, kompreneble, al Gérard, nia plurjardeka kasisto kaj bonvenon al Jeannine, lia anstataŭulino.

Grava renkontiĝo okazos la 3-an de Junio en Mûrs-Érigné, la Bio-Festo. Ni partoprenos. Venu renkonti nin ĉe la budo kaj ĝuu la etoson !

Pierre Jagueneau, Prezidanto

Quelques mots

Un grand merci aux membres et aux amis qui ont participé à notre Assemblée Générale. Merci également aux membres qui ont aidé notre groupe en envoyant leur procuration. Merci, bien sûr à Gérard, notre trésorier depuis plusieurs dizaines d'années et bienvenue à Jeannine, sa remplaçante.

Une importante rencontre aura lieu le 3 juin à Mûrs-Érigné, la Fête-Bio. Nous y participerons. Venez nous rendre visite à notre stand et profitez de l'ambiance.

Pierre Jagueneau, Président

Nia monata legado

Tri fratoj

Estis iam viro, kiu havis tri filojn. Krom la domo, en kiu li loĝis, li posedis nenion. Ĉiu el la filoj dezirus heredi ĝin, sed la patro amis ĉiujn same kaj li ne sciis, kion fari por ne esti maljusta; plej simple estus vendi la domon kaj dividi la monon, sed li ne volis tion fari, ĉar ĝi estis hejmo de liaj patroj kaj prapatroj. Fine li trovis rimedon kaj diris al la filoj :

"Iru en la mondon, provu viajn kapablojn kaj ĉiu lernu metion; kiam vi revenos, tiu ricevos la domon, kiu faros plej bonan majstroverkon."

La filoj konsentis. La plej aĝa decidis fariĝi forĝisto, la dua barbiro, la tria skermisto. Ili difinis la tagon de la reveno kaj foriris.

Feliĉe ĉiu trovis bonan majstron kaj plene ellernis sian metion. La forĝisto subforĝis la ĉevalojn de la reĝo kaj pensis:

"Farita estas la afero, la domo estas via."

La barbiro razis nur altrangulojn kaj pensis la samon. La skermisto ricevis multe da batoj, sed li kunpremis la dentojn kaj ne ĉagreniĝis, ĉar li pensis:

"Se vi timos batojn, vi neniam ricevos la domon."



Kiam pasis la difinita tempo, ili revenis al la patro; sed ili ne sciis, kiamaniere trovi plej bonan okazon por montri sian arton, sidis kune kaj interkonsiliĝis. Subite ili ekvidis leporon, trakuranta la kampon. "Jen ĝi venas kvazaŭ invitita," diris la barbiro, prenis sian pladeton kaj sapon, ŝaŭmigis ĝin, ĝis la leporo proksimiĝis, poste dum ĝia kurado sapumis ĝin kaj razis ĝian barbon: li ne vundetis ĝin, nek kaŭzis doloron.

"Tio plaĉas al mi," diris la patro, "se viaj fratoj ne estos pli lertaj, la domo estos via."

Post momento galope preterveturis sinjoro en kaleŝo.

"Nun vi vidos, patro, kion mi scias," diris la forĝisto, kuris al la kaleŝo, deŝiris de la galopanta ĉevalo la kvar hufiferojn kaj

Notre lecture du mois

Les trois frères

Il était une fois un homme qui ne possédait que la maison dans laquelle il habitait avec ses trois fils. Chacun aurait bien voulu en hériter à la mort de leur père mais celui-ci aimait autant l'un que l'autre et restait indécis. Il aurait pu répartir l'argent d'une vente, cependant, il ne souhaitait pas céder la maison car elle lui venait de ses ancêtres. Enfin il lui vint une idée et dit à ses fils :

«Allez sur les chemins et apprenez chacun un métier, lorsque vous reviendrez, celui qui fera le meilleur chef-d'oeuvre recevra la maison.»

Cela satisfaisait les fils. L'aîné choisit d'être maréchal-ferrant, le puîné barbier et le benjamin maître d'armes. Ils se mirent ainsi d'accord sur la date de leur retour et se séparèrent.

La Providence fit si bien que chacun trouva un maître compétent auprès duquel ils apprirent avec justesse. Le forgeron devait panser la monture royale et déclara : maintenant tu es paré tu auras la demeure. Le barbier qui rasait de nombreux gentilhommes pensa aussi : la bâtisse ce serait bien. Le maître d'armes recevant quelques coups mais serrant les dents et ne s'en laissant pas compter, pensait : ne crains pas les coups ainsi tu hériteras de la maison.

Lorsque vint le moment du retour, ils se retrouvèrent de nouveau chez leur père. Mais ils ignoraient comment ils devraient trouver la meilleure occasion de démontrer leur art. Ils se réunirent pour y réfléchir et alors qu'ils étaient assis, un lièvre vint à passer devant leurs yeux.

«Eh !», s'exclama le barbier, «Ça tombe à pic» il se saisit d'un bol de savon, fit de la mousse, jusqu'à ce que le lièvre revint, puis le savonna et lui tailla une barbe de bélien en pleine course et cela sans le couper et sans lui abîmer le poil.

«Ça me plait bien», dit le père, «si les autres ne font pas mieux, alors la maison est à toi.»

Peu après, arriva un chevalier dans une voiture lancée en pleine course.

«Vous allez voir père, ce dont je suis capable», affirma le maréchal-ferrant. Il bondit après la voiture, empoigna le cheval qui menait le train, lui ôta les quatre fers et le ferra à neuf en pleine cavalcade.

«Tu es un sacré bonhomme», s'enthousiasma le père, «tu fais les choses aussi bien que ton frère,

Sekvo de la antaŭa paĝo

alnajlis kvar novajn.

"Brave", diris la patro, "vi ne estas malpli lerta ol via frato; mi ne scias, al kiu mi devas doni la domon."

La tria diris:

"Permesu ankaŭ al mi montri mian arton."

Ekpluvis, la skermisto eliris la spadon kaj eksvingis ĝin super la kapo: neniun guto falis sur lin. La pluvo pligrandiĝis kaj fine la akvo fluis kvazaŭ el kuvo: la skermisto svingis la spadon pli kaj pli rapide kaj restis tute seka kvazaŭ sub tegmento.

Ekmiroregis la patro, vidante tion kaj diris:

"Vi faris plej bonan majstroverkon, la domo estas via."

La du aliaj akceptis la verdikton sen protesto. Ĉar ĉiuj tri amis unu la alian, ili restis en la domo kaj ĉiu laboris en sia metio; kiel lertaj specialistoj ili havis grandan klientaron. Ili vivis feliĉe ĝis maljuna aĝo, kaj kiam unu malsaniĝis kaj mortis, la du aliaj tiel ĉagreniĝis, ke ankaŭ ili malsaniĝis kaj mortis. Ĉiujn tri, ĉar ili tion deziris kaj tiom amis unu la alian, oni kuŝis en la saman tombon.

Fratoj Grimm

Trad. Kazimierz Bein

Fonto : www.steloj.de/esperanto/verkoj.html

je ne sais pas à qui je dois céder la maison.» Alors le troisième annonça : «Père, laisse moi aussi une fois tenter ma chance» et alors qu'il se mettait à pleuvoir, il tira son sabre et le balança si habilement au-dessus de la tête de son père qu'aucune goutte ne lui tomba dessus. Et bien que la pluie redoublât et qu'enfin elle fut aussi forte que si quelqu'un vidait sa baignoire du haut du ciel, il agita son sabre toujours plus vite de sorte que le père resta aussi au sec que s'il se fut tenu sous un toit.

Voyant cela, le père s'étonna et déclara : «Tu as réalisé le meilleur ouvrage, la maison est maintenant à toi.»

Les autres frères en furent aussi satisfaits et parce

qu'ils s'aimaient comme ils s'étaient toujours aimés ils restèrent tous les trois ensemble dans la maison. Ils travaillèrent si bien leur art qu'ils gagnèrent beaucoup d'argent. Ainsi vécurent-ils dans la joie jusqu'à un âge avancé et lorsque l'un d'eux tomba malade et mourut, les deux autres aussitôt en furent si attristés qu'ils en devinrent malades et moururent à leur tour. Ainsi, tous trois furent étendus dans le même tombeau car ils l'avaient ainsi décidé et qu'ils s'étaient tant aimés.

Les frères Grimm

Trad. René Borjes

Source : www.steloj.de/esperanto/verkoj.html

CAMPAGNE ORGANISÉE PAR ESPÉRANTO-FRANCE ET SAT-AMIKARO

l'espéranto au bac!

WWW.ESPERANTO-AU-BAC.FR

Je reçois comme un honneur la proposition que me font les deux associations Espéranto-France et SAT-Amikaro de parrainer cette pétition en faveur de l'espéranto. Je souhaite que l'enseignement de l'espéranto soit officialisé par les autorités de nombreux pays. Un jour viendra où tout être humain saura utiliser l'espéranto comme un instrument de mise en commun.

Albert Jacquard

CAMPAGNE ORGANISÉE PAR ESPÉRANTO-FRANCE ET SAT-AMIKARO

l'espéranto au bac?

JÉS!*

* oui!

WWW.ESPERANTO-AU-BAC.FR

SIGNEZ!

PÉTITION PARRAINÉE PAR ALBERT JACQUARD

L'espéranto offre une ouverture sur l'ensemble de la planète

1 Les langues actuellement éligibles comme option au bac n'ouvrent que sur un nombre restreint de pays. Les lycéens qui choisiront l'espéranto auront rapidement accès à tous les pays du monde où l'espéranto est pratiqué (une centaine à ce jour). Ainsi l'espéranto constitue une porte ouverte vers toutes les cultures. Le Pasporta Servo, service d'hébergement chez l'habitant, permet déjà aux espérantophones de découvrir la réalité d'un pays en dehors des sentiers touristiques.

L'espéranto est une langue facile à apprendre

2 La simplicité de l'espéranto met les élèves en situation de succès. Tout d'abord, l'espéranto est une langue ludique : les règles de conjugaison et de construction des mots permettent rapidement de faire des phrases et d'avoir des échanges. En permettant de passer à la pratique plus vite, l'espéranto donne une autre vision de l'apprentissage des langues. Enfin, les principes de construction des mots permettent d'économiser la mémoire (voir encadré).

L'espéranto est une langue pour tous

3 Beaucoup plus simple à apprendre donc plus vite enseigné, l'espéranto peut être appris partout et par tous : dans les pays pauvres où les budgets manquent ; par les élèves ne faisant pas de longues études.

Kadre de la 20-a datreveno de la Esperanta Grupo en Le Mans la 11-an de Decembro 2011

Vizito al la Centro de la pergameno kaj miniaturo-arto (en Rouillon apud Le Mans)

Dum la vizito, krom demonstro pri skribado, diversaj anseraj plumoj, kalamoj (pintigita kano) kaj la fama nigra inko de la mezepokaj monaĥoj estas disponigataj al ĉiuj.

Oni malkovras ankaŭ pergamenan atelieron, preparadon de specifaj koloroj por miniaturo-arto sur pergamenoj, kaj aplikadon de la mondfama ora folio.

Ni resumas pri la unua ĉambro : La pretigado de besthaŭtoj kiel en la meza epoko : oni uzas nur la haŭtojn de dombestoj (kaproj, ŝafoj, bovidoj) ; neniam tiujn de sovaĝbestoj ĉar ili estas tro dikaj, tro densaj.

La haŭtoj estas banitaj dum unu monato en kaŭstika kalko. En la loko, akraj odoroj ŝvebas, tiaj de amoniako, urino... preskaŭ neelteneblaj. Post tiu monatperiodo, jen la diversaj etapoj de la pretigado :

- **Senlanigado** per ilo nomata "feraĵo" kiu el la haŭto eltiras lanon. La rezulton oni nomas "pleine fleur" : glata haŭto, ledo kun origina dikeco, la plej fortika.

- **Senkarnigado** : agado forpreni la karnon (el la alia flanko, klaraspekta). Oni tiel obtenas "la kruston". Denove la haŭto estas mergita en la banon kaj iĝas eltirebla. Oni tiam obtenas "blankaĵon".

- **Sekigado** sur horizontala kejlita kadro. Ĉi procedo nomiĝas "pinĉi" la haŭton.

- **Sengrasigado kaj blankigado** : Oni aldonas kreton por blankigi la du flankojn de la pergameno kaj ankaŭ por eltiri



Sekigantaj haŭtoj

la grasajon. Oni eltiras la troaĵon per ilo nomita "ferskrapilo". Ĉiu flanko estas tanita dum du aŭ tri horoj per pumiko.

La haŭto plu sekigĝos dek kvin tagojn sur la kadro.

Per ĉiuj defalaĵoj, post kribrado, oni preparas haŭtgluon (uzata ekzemple, por munti ĉeval-selon, necesas 5 aŭ 6 litroj da haŭtgluo). La "veleno" estas realigita per mortnaskitaj bovidoj.

Jen kelkaj prezindikoj :

- cent eŭroj por ĉiu folio mane ellaborita,

- ses mil eŭroj por libro de sesdek paĝoj.

Surloke oni povas vidi libron, faritan en la muzeo mem : ĝi valoras 250 000 €. Por fabriki ĝin, necesas 4000 horoj da laboro, po du horoj paĝe.

Kompreneble, post la prezentado de tiu ĉi libro, en ties sekurkofron, oni rapide remetis ĝin !

Geneviève kaj Maurice Gourichon

Dans le cadre du 20ème anniversaire du Groupe Espéranto du Mans le 11 décembre 2011

Visite du Centre du parchemin et de l'enluminure

(à Rouillon près du Mans)

Au cours de la visite, outre une démonstration d'écriture, sont mises à disposition des plumes d'oie, des calames (roseau taillé en pointe) et la fameuse encre noire des moines du Moyen-Age. On y découvre aussi un atelier de parchemins, la préparation des couleurs spécifiques de l'enluminure sur parchemin et l'application de la légendaire feuille d'or.

Nous résumons au sujet de la première salle :

La préparation des peaux de bêtes comme au Moyen-Age :

On utilise seulement les peaux d'animaux domestiques (chèvres, moutons, veaux) ; jamais celles d'animaux sauvages car elles sont trop épaisses.

Les peaux sont trempées pendant un mois dans la chaux vive. Dans le local, planent des odeurs âcres d'ammoniaque, d'urine... presque insoutenables. Après cette période d'un mois, voici les diverses étapes de la préparation :

- **L'ébourage** avec un outil nommé "fer" qui retire la laine de la peau. On obtient une peau "pleine fleur" (peau côté lisse - un cuir à l'épaisseur d'origine : le plus résistant)

- **L'écharnage** : consiste à retirer la chair sur l'autre face, d'aspect clair. On obtient "la croûte". La peau est à nouveau plongée dans le bain et devient "un blanc", extensible.

- **Le séchage** : Il se fait horizontalement sur un cadre chevillé. L'action s'appelle "pincer" la peau.

- **Le dégraisage et blanchiment** : On rajoute de la craie pour blanchir les deux côtés du parchemin et aussi retirer le gras. On retire le surplus avec un outil : "le fer à édosser". Chaque côté est tanné pendant deux ou trois heures avec une pierre ponce. La peau séchera encore quinze jours sur le cadre.

Avec tous les déchets, après filtrage, on prépare une colle de peau (par exemple, pour assembler une selle de cheval, on utilise cinq ou six litres de colle de peau).

"Le velin" est réalisé avec des veaux morts-nés. Quelques références en matière de prix :

- cent euros pour chaque feuille faite manuellement,

- six mille euros pour un livre de soixante pages.

Sur place on peut voir un livre, fait à l'intérieur du musée, dont la valeur est de 250 000 €. Pour le fabriquer, il a fallu 4000 heures de travail, à raison de deux heures par page.

Evidemment, après la présentation de ce livre, on le remet rapidement dans son coffre sécurisé.



En Brazilo, kurso de Esperanto per Radio

el Fabiano Henrique




Ĉiudimanĉe Radio Rio de Janeiro elsendas lecionojn de Esperanto. La programo nomiĝas Kurso de Esperanto per Radio.

Radio Rio de Janeiro - 1400 AM

La disaŭdigoj okazas je la 6:45, laŭ brazila horo. Tiu programo estas inter la plej aŭskultataj de la metropola regiono de Rio-de-Janeiro, laŭ informoj de IBOPE (la plej grava statistika instituto de Brazilo). La aŭtoroj de la metodoj adoptitaj estas Sylla Chaves kaj Jair Salles.

Radio Rio de Janeiro elsendas per mezaj ondoj en la frekvenco 1400 kHz kaj per interreto ĉe la adreso : http://www.radioriodejaneiro.am.br/?page_id=364



Plia usona filmo kun Esperanta parolado

En la jaro 2011 aperis la fantaziema usona sciencfikcia horrorfilmo "Atako de la lunaj zombioj", kiu estis tradukita kaj dublita al Esperanto laŭ la iniciato de la reĝisoro Christopher Mihm. Li ne nur decidis, ke ankaŭ lia venonta filmo, "Domo de fantomoj", havu Esperantan paroladon, li eĉ eklernetis mem Esperanton. "La origine esprimita celo de la lingvo efektive ŝajnas esti realigata ene de la komunumo", li diras en intervjuo de Chuck Smith.

Christopher Mihm : La originala teksto de la intervjuo en la angla ĉe Transparent Language : From Moon Zombies to a House of Ghosts.

<http://www.transparent.com/esperanto/from-moon-zombies-to-a-house-of-ghosts/al-kiu-mi-referencis>.

Chuck Smit : **Se ni unue reiru al la Lunaj zombioj, kiel ĝia apero en Esperanto igis ĝin malsama ol viaj antaŭaj filmoj?**

Christopher Mihm : La fakto ke la filmo haveblas en Esperanto kaŭzis ke ĝi estis prezentita en multaj novaj lokoj en la mondo, kie neniu el miaj antaŭaj filmoj aperis, ekzemple en Brazilo, Pollando kaj Danio. La ebleco montri miajn filmojn tutmonde estas grandega paŝo antaŭen, kaj mi specife devas danki Esperanton pro tio !

Kial vi kredas, ke parolantoj de Esperanto interesiĝas pri viaj filmoj ?

Se ne pro io alia, do jam pro tio, ke ekzistas tiel malmultaj spektindaj filmoj en Esperanto. La miajn mi ja certe opinias spektindaj. Ili ankaŭ taŭgas por la tuta familio, ne ĉar ili estus aparte faritaj por infanoj, sed ĉar ankaŭ infanoj povas spekti ilin. Ili simple estas amuzaj kaj povas funkcii kiel bona vespera distro por grupoj de parolantoj kiuj lernas la lingvon (ili bone funkcias kiel lerniloj) aŭ kiuj jam bone parolas, kaj volas ĝui iom da frenezumado ! Laste, unu el miaj celoj estas nerekte forviŝi la "malbonan guston" kiun la filmo Incubus de William Shatner en la 1960-aj jaroj lasis en la kolektiva buŝo de la Esperanto-komunumo. Tiu filmo estas fifama pro sia buĉado de la lingvo, kaj mi volus ke oni konsideru miajn filmojn tia, kia Incubus devintus esti. Kaj eble iugrade tio okazas.

Kial vi decidis dubli kaj tekstumi plian filmon por ni?

La Esperanto-komunumo estis tiel afabla kaj subtenema, ke honeste dirite ŝajnus al mi malĝuste ne produkti sonon kaj tekstojn en Esperanto por "Domo de fantomoj". Aldone, la laboro pri la lingvo por Atako de lunaj zombioj ekinteresis min pri la lingvo ĝenerale. Mi pensis, ke ripetado de la sperto helpus min antaŭenigi mian komprenon de la lingvo.

Vian komprenon de la lingvo? Ĉu tio signifas, ke vi efektive eklernis Esperanton? Se jes, kio vin inspiris kaj kiel vi sukcesas?

Jes, tio ja estas vera. Post rekta partopreno en la kreado de la Esperanta sontrako por la lasta filmo, mi rimarkis ke

mi iom ekkomprenis la lingvon - ĝi vere estas tiom facile lernebla ! Mian tutan vivon mi spertis grandajn problemojn pri lernado de aliaj lingvoj.

Mi ĉiam volis lerni lingvojn. La kontakto kun lingvo tiel facile komprenebla kiel Esperanto donas al mi la esperon, ke mi povos superi la malfacilaĵon. Bedaŭrinde miaj studoj progresas multe pli malrapide ol mi ŝatus, ĉefe pro la kvanto da tempo kiun mi devas uzi por mia regula laboro, por kreado de la filmoj, prizorgado de la Mihmiverso kaj por mia familio.

Kiajn impresojn vi havas pri la Esperanto-komunumo?

La Esperanto-komunumo dum la tuta tempo estis mirinda. Temas pri bonegaj homoj kiuj estis ekstreme subtenemaj kaj amikaj, kaj laŭ la maniero en kiu ili akceptis mian filmon, kaj laŭ la helpo kiun ili donis pri lernado de la lingvo. Mi ne povus deziri pli agrablan aron da homoj.

Kiun rolon laŭ vi Esperanto ideale povus havi en la mondo?

Plej impresa por mi estas, kiel la origine esprimita celo de la lingvo efektive ŝajnas esti realigata ene de la komunumo. La lingvo vere ŝajnas kunigi homojn. La Esperantlingvaj sontrakoj de miaj filmoj estas bonega ekzemplo. Homoj de ĉie en la mondo aldonas siajn voĉojn al la filmo, kaj ilia nura komuna eco estas, ke ili parolas Esperanton. Por mi ĝuste tio estas la rolo, kiun Esperanto devus havi en la mondo: kunigi homojn!

Finfine, kiel la Esperanto-komunumo povas subteni vian novan filmon?

La plej granda afero kiun povas fari la Esperanto-komunumo estas disvastigi la famon. Organizu montradojn kaj aranĝojn, aŭ simple kolektu viajn amikojn kiuj parolas Esperanton kaj provu la filmojn. Minimume, ili estas amuzaj, distraj, kaj taŭgaj por la tuta familio.

Kampanjo por subteni la novan filmon okazas en la retejo Kickstarter. Vidu :

<http://www.kickstarter.com/projects/1083936700/esperanto-language-scifi-horror-film-with-ghosts-a>

Fonto: www.liberafolio.org

Nia Ĝenerala Kunveno

L'Assemblée Générale du Centre Culturel Angevin d'Espéranto a eu lieu le 3 mars 2012, salle Mot à Mot au Centre Jean Vilar d'Angers. 25 personnes étaient présentes et le quorum atteint avec 18 adhérents présents et 11 procurations. Comme chaque année, ce fut l'occasion de faire le point sur les actions passées et futures.

En 2011 ont eu lieu les activités habituelles : les présentations de l'espéranto au public (Fête Bio, Journée Internationale de la Paix, étudiants à l'UCO, Forum des Associations Agora, journée-découverte des associations de la Roseraie, ...), les cours sous la houlette de Jeanik (conversation) et Pierre (débutant), l'édition de la "Anĝeva Folio" (réalisée par Jean-Yves et Geneviève), des soirées-jeux (très appréciées pour apprendre en s'amusant et inversement !). Le 21 septembre étant un mercredi, la Journée mondiale de la Paix fut remarquable avec la participation d'enfants venus de centres aérés et pour lesquels avaient été préparés divers ateliers (dont un atelier de jeux en espéranto).

2011 fut également une année "japonaise", d'une part avec l'envoi de messages d'encouragements au collectif des "Femmes d'Hiroshima" (pour la paix et le désarmement nucléaire), et d'autre part avec les messages reçus de Hori Yasuo, témoignages de l'après-Fukushima (messages traduits et mis sur le site Internet de l'association).

Il est à noter également, en 2011 :

- une **présentation sur la Tanzanie** par Jonathan (qui a effectué un séjour dans le village de Mramba, venu à Angers en 2008)
- l'**accueil d'un groupe de 19 Chinois** qui ont visité le château et le "Chant du Monde", guidés par Jeannine.
- la **collecte de signatures** pour la pétition nationale "Espéranto au baccalauréat".



Des saynètes en espéranto furent présentées à l'assemblée



- et enfin, la mise à disposition, par la mairie d'Angers, d'un local pour la bibliothèque de notre association. Les livres et documents divers y ont été déménagés, il faut maintenant les répertorier et les classer, énorme travail (2000 ouvrages) pour lequel plusieurs séances ont déjà eu lieu. Rappel : le catalogue de la bibliothèque est consultable sur notre site Internet.



Les projets 2012 sont notamment :
 - **participation à la Fête Bio** (le 3 juin) et à la Journée Mondiale de la Paix (le 21 septembre), manifestations auxquelles le Centre Culturel Angevin d'Espéranto est partie prenante depuis déjà plusieurs années.

- **aide au congrès national de l'Association Française des Cheminots pour l'Espéranto** qui se déroulera à Angers. (NDLR: ce congrès a eu lieu du 30 mars au 3 avril).

Le rapport d'activités et le bilan financier ont été lus en séance et approuvés unanimement par

l'assemblée. La cotisation pour 2012 reste à 21 euros mais sera probablement augmentée, modestement, l'an prochain. Il a également été procédé à l'élection du conseil d'administration : Gérard, après de très nombreuses années en tant que trésorier, ne se représente pas et les 10 membres restants sont réélus à l'unanimité.

La réunion s'est achevée par des sketches humoristiques donnés par les élèves (et le professeur) du cours Conversation, et par la traditionnelle galette.

Le compte-rendu complet de l'Assemblée Générale est disponible sur simple demande.

Ni ludis

N° 14	1	GIGANTISMO	A	GANGLIONOJ
	2	OKINAVO	B	URSULO
	3	NORVEG - IDA	C	GORILO - MOL
	4	ANET	Ĉ	AKV - INUITO
	5	LULI - KUGLO	D	NIEL - IES
	6	IRONIO - IOM	E	TNG - KOSMO
	7	OS - UEST	F	IA - AU - TAGA
	8	NUMISMATO	G	SVINGI - TIR
	9	OLOT - OGIVO	Ĝ	MODELO - OVO
	10	JOLOJ - AROM	H	ATOMO - OM

Ni ludas

Horizontale :

- 1) Tempmezurilo.
- 2) Korta birdino.
- 3) Progresigilo (sf) – Alfabeto supersigno (sf).
- 4) Prep. montranta la agkaŭzon – Libera tago.
- 5) Malfacile elirebla vojaro.
- 6) Malofta metalo (sf) – Vehiklo de Tarzano.
- 7) Kapo de Moliero ! – Maceri tekseblan planton en likvo – Senbrile blanketa (sf).
- 8) Vira nomo aŭ arbusto (sf) – Duone naĝi ! – Pronomo.
- 9) Posesivo – Hompumpilo (sf) – Estonta birdo (sf).
- 10) Kavoj por mortulo - Monato.

Vertikale :

- A) Ĝentilaj ceremoniaj formuloj (sf).
- B) Nomo de iu katolika kongregacio.
- C) Monato (sf) – En iu tute ne difinita tempo.
- Ĉ) Japana dramo – (Inv) Diri per laŭta akra voĉo.
- D) Argila tero (sf) – Komenco de komenco !
- E) Pronomo – Idino de gepatroj.
- F) Teni interne de io – Provizi per bataliloj (sf).
- G) (Inv) Li forte amas kaj helpas sian patrujon (sf).
- Ĝ) Loĝantoj de silkindustria franca urbo.
- H) Maniero en kiu la objektoj sekvas unu la alian – Drupo de mediteranea arbo.

N° 15 (sf) : sen finaĵo (Inv) : inverse Ũ = U

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

Kalendaro

Selektitaj renkontoj en Eŭropo en Majo, Junio, Julio

9 - 12 majo

16-a Konferenco de Alp-Adriaj Esperantistoj en Trieste, **Italio**. Esperantistoj de regiono Alp-Adrio renkontiĝas kaj partoprenas la Internacian Konferencon de Eŭropa Esperanto-Unio. Inf.: Edvige Ackermann, via Valerio 110. IT-34127 Trieste, Italio.

Rete: nored@tiscali.it

17 - 20. majo

Renkonto de Interkant', preparado de "Karmen" en Greziliono, Francio. Inf.: Esperanto-KulturDomo, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, **Francio**. Telefono-respondilo: +33-2.41.89.10.34

Rete: kastelo@gresillon.org

18 - 20. majo

Sveda Esperantokongreso en Helsingborg, **Svedio**. Prelegoj, jarkunvenoj, ekskursoj, distraĵoj ... en bela Helsingborg, la Perlo de la Sundo. Inf.: Sveda Esperanto-Federacio, Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, SE-113 42 Stockholm, Svedio.

Rete: sefkongr2012@esperanto.se

19 - 25. majo

64-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Herzberg am Harz, **Germanio**. Konatiĝo kun la Esperanto-urbo Herzberg, vizitoj al la plej belaj lokoj de la Harz-montaro (ekz. Göttingen, Goslar), tuttaga ekskurso por nostalgia etŝpura trajno kaj multaj muzikaj, kulturaj eventoj. Inf.: Germana Esperanto-Centro/ Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6; Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de

La postkongreso (GEK) okazos dum pentekosto 2012 en Berlin-Lichtenberg

4 - 14. junio

Ekkonu Rumanion de la Delto de Danubo ĝis Karpatoj! en Braŝovo, **Rumanio**. La braŝovaj esperantistoj proponas al vi belegan, interesan 10-tagan someran aranĝon en Rumanio, dum kiu vi povas konatiĝi kun diversaj regionoj de nia lando, de la Delto de Danubo tra ĉefurbo Bukureŝto ĝis Karpatoj. Inf.: Rodica Todor, B-dul Valea Cetății 22, bl. B 24, sc. A, ap. 5, RO-500289-Brașov, Romania. Rete: rodica_todor@yahoo.com

8 - 15. junio

Esperanto-kurso kun antaŭekskurso en Naantali, Tampere, Heinävesi en **Finnlando**. La jam tradicia kursosemajno en Popola Instituto de Valamo, (10 - 15. junio). Ĉiuj kursoniveletoj, kursanoj el la tuta mondo, vizito en la areo. Instruos Atilio Orellana Rojas kaj finnlanda instruisto, kursogvidanto Tiina Oittinen. Antaŭekskurso ĉe muminoj en Muminmondo de Naantali kaj Muminvalo en Tampere (8 - 10. junio). Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Rete: eafsekretario@esperanto.fi

22 - 24. junio

10-a Kongreso de kroataj esperantistoj en Koprivnica, **Kroatio**. Jubilea landa kongreso kun simpozio pri 125-a datreveno de Esperanto, kultura kaj junulara programoj, turisma ekskurso en la regiono. Inf.: Kroata Esperanto-Ligo kaj Dokumenta Esperanto-Centro, DEC, p.p. 79, HR-48350 Đurđevac, Kroatio.

Rete: kroata.kongreso@gmail.com

26. junio - 3. julio

21-a MELA (MEMzorga LAG-umado) en **Slovenio**. Muŝli-MELA kun MUziko kaj ŜLimo apud rivero en Slovenio, inkluzive la muzikfestivalo Rock Otočec. Inf: Andi, andim(ĉe)gmx(punkto)li, +49-1577-427324

27. junio - 3. julio

2-a Internacia Esperanto-Semajno, IES en Erevan kaj la ripozurbo Tsaghkadzor, **Armenio**. Temo: La libro kiel rimedo de kultura dialogo. Inf.: ies-2.armenio@area.am

30. junio - 4. julio

3-a GES (Granpolia Esperanto-Somero) en Wagrowiec, **Pollando**. Kulturpolitika aranĝo okaze de 125-a jubilea jaro. Inf.: EDE-PL, PL-62-100 Wagrowiec, Kosciuszki 49, Pollando. s.rynduch@gmx.de

30. junio - 8. julio

Roskilde Festivalo en Roskilde, **Danio**. La ĉiujara grandega muzikfestivalo kun senpaga partopreno por esperantistoj - volontulo!

Inf.: DEJO roskildefestivalo@gmail.com

Fonto: <http://www.eventoj.hu>

Séjournez à Grésillon pour apprendre ou réapprendre l'Espéranto !

Restadu en Greziljono por lerni aŭ re-lerni Esperanton !



Somera programo kun 4 laŭ-temaj semajnoj

Resumo interrete : gresillon.org/somero

Julio-21/28 :

Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj interrete : gresillon.org/s1

Julio-28/Aŭgusto-04 :

Alternativa semajno kun verd-politika seminario kaj E-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj.

Informoj interrete : gresillon.org/s2

Aŭgusto-04/11 :

Turisma kultura semajno, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze. Informoj interrete : gresillon.org/s3

Aŭgusto-11/20 :

Pup teatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj.

Informoj interrete : gresillon.org/s4

Kontaktaj : kastelo@gresillon.org
+33-241 89 10 34, www.gresillon.org

Adreso : GRESILLON
49150 SAINT MARTIN D'ARCE, France
Jara agendo : gresillon.org/agendo

Jiří Pištora (1931 - 2011)

Kelkaj inter ni konis faman esperantiston Jiří Pištora, eks-fervojiston el Ĉeĥio : li venis al Greziljono por instrui Esperanton, interalie al pluraj anĝevanoj. Li tre afable gastigis eksterlandanojn en sia feria kabano, kie li fieris montri siajn francan kaj bretonan flagojn. Li mortis la 12-an de novembro 2011 en Ĉeska Třebova. Ekde 1985 li fariĝis oficisto kaj fine direktoro de la Urba Muzeo de Esperanto en Ĉeska Třebova ĝis 2003, kaj poste li helpis la kreadon de la nuna muzeo de Svitavy.



Bérengère Cheverry (1909 - 2012)

Kiel anoncote en la lasta "Anĝeva Folio", forpasis S-ino Bérengère Cheverry, 103-jaraĝe. Same kiel André Frangeul, ŝin multaj konis pro ŝia multjara agado ne nur en la Anĝeva Kulturcentro de Esperanto, kies vicprezidantino ŝi estis dum multaj jaroj, sed ankaŭ en kadre de la Centr-Okcidenta federacio (kiel multjara sekretario) kaj en Esperanto-Kulturdomo Greziljono. Funebra ceremonio okazis la 13-an de januaro; triono de la ĉeestantoj estis Esperantistaj amikoj kiu venis por lastfoje adiaŭi ŝin.



Kunhelpis al tiu eldonaĵo : Geneviève Gourichon, Jean-Yves Grille, Pierre Jagueneau, Jeanik Marolleau, Gérard Musset, Laurent Vignaud

Vous informer

www.esperanto-angers.fr

www.esperanto-france.org
www.esperanto-jeunes.org

www.uea.org
www.esperanto.net

Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers - Tél. 02 41 73 17 97
Courriel : info@esperanto-angers.fr